

Tomas Tranströmer,

## Ŝtormo

*tradukita de Pejno Simono*

Voje jen embuskas prakverko granda -  
kvazaŭ alko ŝtona, kornaro kronas  
mejlvastaĵon antaŭ septembro-mara  
burgo verdnigra.

Norda ŝtorm'. Sezono de ruĝaj sorpoj.  
Se sendorma nokto, vi aŭdas kiel  
sia-ĉele stamfas stelaroj stale,  
volbe la arbojn.

*Traduko de la Sveda poemo "Storm" de TOMAS TRANSTRÖMER (\*1931-04-15) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

*Arg-977-1970 (2014-03-14 11:19:55)*

*Pri la verkinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Tomas\\_Transtroemer](http://eo.wikipedia.org/wiki/Tomas_Transtroemer).*